



INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ

Etnismo

N-ro 116 - 31.12.2025

MILEI, KOŜMARO
DE LA AŬTOKTONAJ
POPOLOJ

PREZIDENTO
CATHERINE CONNOLLY
KAJ LA IRLANDA LINGVO

CONCHÚR Ó GIOLLAGAIN.
SPERTULO PRI LINGVA
PLANADO



**Ngũgĩ wa
Thiong'o:
inter lökeco
kaj tutmondeco**

Etnismo

N-ro 116 - 31.12.2025



Foto de la kovrilo: Daniel A Anderson/AP

Eldonista letero

► Kion fari, kiel agadi?	3
<i>Ngũgĩ wa Thiong'o</i> , la lingva instigo sur la kolonia vundo	4
<i>Milei</i> , koŝmaro de la aŭtoktonaj popoloj	9
► "La demokratia pakto estis rompita"	10
Prezidento <i>Catherine Connolly</i> kaj la irlanda lingvo	11
«Kiam la stabileco de la lingvo reduktiĝas, tiu ĉi fariĝas fakultativa, suplementa».	
<i>Conchúr Ó Giollagain</i> . Spertulo pri lingva planado	12
Memore al <i>Uwe J. Moritz</i>	15
Koncize el...	17
Alvoko al komuna laboro	19

Eblas reklami en Etnismo!

- **Anonctarifo:** (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6 p. 15.
- Rabato por IKEL-membroj: 10 %.

La membroj de la **Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL)** ricevas **Etnismo**-nsenkrompago, minimume 36 paĝojn jare. Unuopa ekzemplero de simpla numero kostas 5 €. Ĉiuj eroj de la «**IKEL-Informilo**» estas oficialaĵoj. La aŭtoroj ne ricevas honoraron. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongigi kaj lingve korekti la kontribuojn.

La artikoloj publikigitaj en **Etnismo** ne nepre esprimas starpunkton de **IKEL**, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Estraro:

- **Prezidanto:** **Rafael BLANCO ARBE** (nafarano-Eŭskio), Sol 2, 31490 Kaseda. Hispanio
retadreso: rblancoarbe@gmail.com
- **Sekretario:** **Nikolas XIL CARVALHO** (asturleono), Zuberoa Auzunea 4-1.D- ES-20400 Tolosa. Gipuzkoa. Euskal Herria/Eŭskio
tel: ++ 34 630 44 68 63,
retadreso: fokomelo.makolji@gmail.com
- **Kasisto:** **Xabier RICO ITURRIOTZ** (eŭsko), Manuel Iradier, 22-1-ezk. ES-01005 Gasteiz, Euskal Herria-Eŭskio, retadreso: xabirico@outlook.com
- **Rilatoj kun esperanto-gazetoj. Reviziado:** **István ERTL** (hungaro), 22, rue Fautelfiels, LU-7355 Helmdange, Luksemburgio, tel. ++ 352 2633-2659, retadreso: istvan.ertl@gmail.com
- **Kunreviziantoj:** **Nicole MARGOT** kaj **Nancy FONTANNAZ**
- **Grafiko:** **Ferriol MACIP i BONET** (kataluno)
Sociaj retoj: **Aleksandr BLINOV** (ĉuvaŝo)
- **Retejo:** www.etnismo.org
- **Forumo:** etnismo@googlegroups.co

Kotizoj kaj kontoj:

Kotizo	eŭroj
Normala	20.00
Subtenanta	30.00
Rabatita	10.00

La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono, kiu aŭ loĝas en (eks) socialisma aŭ «tria-monda» lando, aŭ estas studento aŭ emerito.

Pere de UEA

- Se vi havas konton ĉe UEA
UEA (kodo: ikel-y):
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
(Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam)
- Transpago al la bankkonto de UEA (Tiukaze aldonu 5% al la kotizo):
ING Bank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64
BIC/SWIFT: INGBNL2A

Ĉiukaze indiku "ikel-y" kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certigi, ke via kompleta kotizo alvenas al la IKEL-konto: IKEL absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko- aŭ peradkostojn!

Pere de la kasisto de IKEL

- Pago per **Paypal konto** al **Xabier Rico Iturriotz**,
retpoŝto : xabirico@outlook.com
- Vi povas ankaŭ ĝiri vian kotizon al la persona konto de la kasisto de IKEL. Se vi volus tiel agi, sendu retpoŝton al la kasisto.
- Pere de jenaj aplikajoj al la poŝtelefono de la kasisto: +34655727215
 - ✓ VERSE ekde pluraj landoj de la EU kaj ekde Britio (konsultu ĉe www.verse.me)
 - ✓ BIZUM ekde Hispanio, Eŭskio kaj Katalunio

Perantoj

- Katalunio, Eŭskio, Hispanio: Sandra Vives: sandra@esperanto.cat
- Francio: Alain Favre, Damo de Vi, 171 allée du Quart d'Amot, FR-74140 CHENS/LÉMAN afavre1@hotmail.com (vi povas sendi ĉekojn).
- Norvegio : oficejo@esperanto.no

Venonta redaktolimdato: 30an de aprilo 2026



Kion fari, kiel agadi?

Rafael Blanco Arbe

En IKEL kunsido de UK en *Brno*, ĉeestanto starigis la demandon: en tiu-ĉi nuntempa tute nefavora situacio, kion ni povas fari rilate la minacatajn lingvojn?

Jen trafa, tikla kaj profunda demando, kiu, mi konjektas, puŝis plurajn homojn dum la pasintaj jarcentoj serioze strebi favore al siaj marĝenigitaj lingvoj, aŭ lingvoj de aliaj etnoj.

Historio de la homaro, inter alie, estas historio de apero kaj malapero de lingvoj. Oni mencias kvanton de 5000 malaperintaj lingvoj laŭlonge la jarmilojn, kaj prognozo de UNESCO rimarkas, ke centoj da lingvoj ne plu havos parolantojn en la venontaj jardekoj. Kiel alfronti tiun senesperigan realaĵon?

Multaj esperantistoj vivas en medio, kie malpliigitaj lingvoj trairas ne facilan ekziston. Surloke ili povas, laŭ sia eblo, engaĝiĝi en la subteno al iniciatoj, kiuj pledas por la uzo kaj evoligo de tiuj lingvoj. Ankaŭ ni povas praktiki la internaciisman solidarecon kun komunumoj, kiuj luktas por la daŭrigo kaj transdonado de ia lingvo.

Aliaj vojoj ankaŭ eblas, ekzemple, pledi por la multlingvismo

”

«Bezonatas plue voko, instigo kaj kunlaborado al diverseco, kunvivado, paco, bunte kultura mondo kaj valorigo de tiu universala havaĵo kaj trezoro, kiun ĉiuj lingvoj gardas.»

en internaciaj instancoj kiel UN aŭ Eŭropa Unio, kie superrego de ege malmultaj lingvoj simple kaŝas kaj senglavigas la ekziston de pluraj aliaj. Tiuse, estas signifa la konduto en ege popularaj eventoj sportaj aŭ kulturaj kiel *Eŭrovizio*, kie fakte la angla havas tute privilegian lokon, kaj disvastigataj lingvoj ne havas spacon, eĉ por aperi en la kanto de sia(j) lando(j).

Alternative al *Eŭrovizio* jam de kelkaj jaroj oni aranĝas *Liet Festivalo*-n iaspecan *Eŭrovizion* por la minoritataj lingvoj, kie ja povas partopreni senŝtatataj komunumoj prezentante siajn kantojn per etnaj lingvoj. En 2022 la itala *Chiara Raggi* reprezentis en tiu konkurso la esperantistan komunumon kaj atingis la

luan lokon per la kanto *Mozai-ko*.¹

Apogi kaj diskonigi tiajn aranĝojn ja estas, inter pluraj aliaj agoj, praktika ekzerco por la vidigo kaj vigligo de ne hegemoniaj lingvoj.

En la lastaj jaroj rasismo, superismo, militismo, genocidoj akriĝas. Sudano, Palestino, Ukraino, Okcidenta Saharo, Kongo, Malio... Kondiĉoj ĝenerale malfavoras por la paco, por disvastigo de Esperanto aŭ por defendo de minacataj lingvoj. Ĝuste pro tio, bezonatas plua voko, instigo kaj kunlaborado al diverseco, kunvivado, paco, bunte kultura mondo kaj valorigo de tiu universala havaĵo kaj trezoro, kiun ĉiuj lingvoj gardas.

IKEL delonge agadas por tio. ■

1. Priaj informoj ĉe <https://www.liberafolio.org/2022/12/12/kjara-gajnis-alternativan-eurovidan-konkurson/>

Ngũgĩ wa Thiong'o, la lingva instigo sur la kolonia vundo

Rafael Blanco Arbe

Ankoraŭ batanta koro por la afrikaj lingvoj

La 28an de majo de 2025 forpasis en Buford, Georgio (Usono), *Ngũgĩ wa Thiong'o*, elstara kaj fruktodona verkisto, akademiano, esploristo, lingvo-aktivulo kaj batalanto por la homaj rajtoj. *Ngũgĩ* naskiĝis en suda Kenjo en 1938, kaj kreskis dum la lastaj jaroj de la brita koloniado; li proprasparte konis la altrudon kaj reprezaliigojn de la koloniaj kaj postkoloniaj registaroj. Li senĉese, sur la kampoj teoria kaj ĉefe praktika, dediĉis sian vivon al la disvolviĝo kaj evoluo de la afrika literaturo, strebante al ĉeesto kaj prioritato de la denaskaj afrikaj lingvoj.

En *Atlanta*, post lia morto oni okazigis grandan omaĝon por *Ngũgĩ*, en loko plej signifa pro la lukto rilate civitanajn rajtojn, nome, aKAZ! ATL, en la avenuo *Auburn*, proksime al la tombejo de *Martin Luther King*, kies figuron kaj agadon profunde admiris tiu kenja aŭtoro.

Ankaŭ en aliaj urboj, ĉefe en Afriko, asocioj kaj institucioj aranĝis omaĝojn al *Ngũgĩ*, memore al la gravaj spuroj kaj

”

«Mi iĝis aganto pro la lingvo. Mi volas kuniĝi al ĉiuj, kiuj luktas favore al la marĝenaj lingvoj. Lingvo neniam estas marĝena en tiu komunumo, kiu kreis ĝin.»

proponoj, kiujn li postlasis. Sed same gravaj kiel la ideoj, estas la faroj kaj vojoj, kaj lia vivo atestas plej trafe la ampleksajn kaj konturojn de ege plensignifa influo.

Nefacila, nomada kaj engaĝiĝinta vivo

Ngũgĩ naskiĝis la 8an de januaro de 1938 en *Kamiriithu*, distrikto de *Kiambu*, en la sudo de Kenjo, kaj estis baptita en la presbiteriana eklezio per la nomo *James Ngũgĩ*. Li apartenis al familio de bienistoj, senhavigita de siaj terposedaĵoj fare de la kolonia brita registaro, kaj ankaŭ forte reprezaliita kadre de la kontraŭkolonia lukto de la gerila movado *Maũ Maũ*, en kiu partoprenis pluraj kenjanoj, inter ili, familianoj de *Ngũgĩ*. Unu frato ja estis mortigita kaj la patrino torturita.

Ngũgĩ plaĉe memoris infanaĝajn vesperiĝojn ĉirkaŭ la hejma kameno kun la familio, kie knaboj ĝoje aŭskultadis la popolajn rakontojn de la kikuja tradicio, kaj la estonta verkisto alprenis la nuancojn, muzikon kaj sugestopovon de la lingvo. Unue li vizitis kolonian lernejon en *Kamaandura*, kaj poste en *Maangu*-religian lernejon gvidata de patriotoj el la organizo *Gikuyu Independent* kaj de *Karinga Schools Association*, kie la kikuja lingvo ludis gravan rolon. Tiam ricevis *Ngũgĩ* por la unua fojo aplaŭdon pro teksto verkita en sia denaska lingvo.



En 1952 la brita kolonia reĝimo transprenis la regon en tiuj lernejoj, kaj la angla iĝis la lingvo de la formala edukitinerio de Ngũgĩ. Tiam li ekkonis humiligajn viverojn pro la uzo de la gepatra lingvo, punojn korpajn aŭ animajn, ekzemple surmeton de afiŝo tekstanta «Mi estas stulta» aŭ «Mi estas azeno». Spite al tiu-ĉi spertoj, bonaj studrezultoj ebligis al Ngũgĩ eniri en 1954 en la elitajn *Alliance High School*. Jaron poste, vizitante la familian vilaĝon, li trovis ĝin detruita fare de la soldatoj de la brita kolonia registaro.

En 1959 Ngũgĩ komencis universitatajn studojn en *Makerere University College*, en *Kampala* (Ugando). En 1962 okazis en tiu universitato grava konferenco pri afrika literaturo, kiun ni pri-traktos pli precize sube. Okaze de tiu konferenco Ngũgĩ enman-


igis al la fama verkisto *Chinua Achebe* la manuskriptojn de sia romano *The river between* (La rivero meze) kaj *Weep not, Child* (Ne ploru knabo). Tiu-ĉi lasta, kiu priskribas la ribelon *Maŭ Maŭ* kaj malfeliĉan amaferon inter kristano kaj nekristano, estis la unua anglalingva libro de orientafrika aŭtoro eldonita en Britio.

Ngũgĩ ekstudis en *Leeds*, kaj en 1967 li eldonis *A Grain of Wheat* (Tritika grajno), romanon influitan de la ideoj de *Franz Fanon*. Li ŝanĝis sian nomon *James Ngũgĩ* al *Ngũgĩ wa Thiong'o*, kaj komencis verki en la kikuja lingvo, samtempe instruis anglan literaturon en la universitato de Najrobio, ankaŭ deĵoris en *Makerere* kiel profesoro de kreiva literaturo, en tiu-ĉi universitato li pledis por la malapero de la angla fako kaj por instruado de la parola afrika

literaturo. En 1976 li kunlaboris en la starigo de kulturcentro por la komunuma edukado, en sia naskiĝvilaĝo *Kamĩĩrithu*.

En 1977 venis al la publiko *Petals of Blood* (Sangopetaloj) kaj la teatraĵo *Ngaahika Ndeenda* (Mi geedziĝos, kiam mi volos). La fortkritika enhavo de tiuj verkoj kaŭzis la enkarcerigon de Ngũgĩ; vicprezidanto *Daniel arap Moi* ordonis la areston. En ege akraj kondiĉoj li skribis sur neceseja papero *Caitani mũtharaha-Inĩ* (La diablo sur la kruco), kiu estis la unua romano verkita en la kikuja lingvo. En 1978 oni liberigis lin danke al perado de Amnestio Internacia. La registaro malrajtigis lin havi laborpostenon en Najrobio, kaj li sekve ekziliĝis al Britio kun sia familio; li deĵoris en la universitato de *Bayreuth* kaj studis kinarton en Stokholmo.

Ngũgĩ atente ekzamenis sian kontraŭdiron, profunde senti afrikan identecon kaj pledi por malkolonia sinteno beletre esprimi sin per kolonia eŭropa lingvo.



En ege akraj kondiĉoj *Ngũgĩ wa Thiong'o* skribis sur neceseja papero *Caिताani mŭtharaha-Inĩ* (La diablo sur la kruco), kiu estis la unua romano verkita en la kikuja lingvo.



Pluraj verkoj de *Ngũgĩ wa Thiong'o* estas tradukitaj en la kataluna kaj la okcitana

En 1986 li publikigis *Decolonising the mind* (Malkoloniigi la menson). La kerno de tiu eseo estas la pledo kaj alvoko al utiligado de la lokaj afrikaj lingvoj por konstrui aŭtentikan afrikan literaturon. Inter 1989 kaj 1992 li estis profesoro en *Yale*, poste en la Universitato de Novjorko kaj en tiu de *Irvine*, Kalifornio. En 1996 li partoprenis, kune kun aliaj kvardek fakuloj, en la redaktado de la Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj.

En 2004 li revenis al Kenjo kune kun sia edzino; li estis frapita kaj lia edzino seksagresita. En 2006 eldoniĝis *Mũrogi wa Kagogo* (La mago de la korvo), kiu *Ngũgĩ* mem tradukis en la anglan sub la titolo *The Wizard of the Crow*. En 2010 oni konsideris lin kiel probablan kandidaton al Nobel-premio, sed *Mario Vargas Llosa* ricevis tiun prestiĝan premion. En 2016 *Ngũgĩ* publikigis epikan poemaron *Kenda Muiyru*, kiu pritraktas la originon de la kikuja popolo, per feminisma kaj panafrika rigardo. Por la unua fojo libro verkita en afrika lingvo kandidatiĝis al la internacia *Booker*-premio. *Ngũgĩ* aktive membris en la internacia asocio de verkistoj PEN, kies honora vicprezidanto li estis. Li verkis antaŭparolon al la raporto *La kultura oksigeno* eldonita de tiu prestiĝa institucio en 2016; en tiu teksto *Ngũgĩ* substrekis la bezonon publikigi librojn en afrikaj lingvoj.

Li vizitis pli ol unufoje Barcelonon, kie li ricevis la literaturan premion *Catalonia*, de la asocio *Linguapax* en 2019 pro la disvolvo de la nocio de lingvo kiel kulturo kaj kolektiva memoro. Li legis sian paroladon en la kikuja. Krome *Ngũgĩ* skribis leteron al *Jordi Cuixart*, kataluna verkisto kaj aktivulo enkarcerigita en la kunteksto de la sendependig-cela procezo.

En majo 2022, post jardekoj sub malpermeso, oni ludis ree en Najrobio la teatraĵon *Ngaahika Ndeenda*.

Ngũgĩ wa Thiong'o forpasis la 28an de majo de 2025 en *Burford*, Georgio. Semajnoj antaŭ sia morto li diris: «En Kenjo, eĉ nuntempe estas knaboj kaj gepatroj, kiuj ne kapablas paroli la lokan lingvon. Ili tre feliĉas, kiam ili parolas la anglan, kaj pli feliĉas, kiam iliaj gefiloj ne kapablas paroli sian propran lingvon. Ĝuste tion mi nomas mensa koloniado».

La konferenco de Makerere. Semo por la turnopunkto de la afrika literaturo

La Universitato de *Makerere*, siatempe branĉo de *University of London*, situas en *Kampala* (Ugando). Tie okazis en junio 1962 la Konferenco de angl-esprimaj afrikaj verkistoj, aŭspicita kaj financita de *Society for Cultural Freedom* (organizo siavice financita de CIA). Juna lernanto kaj nekonata en literatura medio *Ngũgĩ*, ankoraŭ *James*, estis invitita ĉeesti kune kun jam famaj aŭtoroj kiel *Chinua Achebe* (vidu ĵusan artikolon ĉe esperanto.org.uk/news/publishing/aferoj-disfalas-r282), *Wali Obiajunwa*, *Rayat Neogy*, *Christopher Okibgo* aŭ la nobelpremiata *Wole Soyinka*.

Dum la konferenco oni starigis la demandon: kio estas la afrika literaturo? La debato montriĝis vigla kaj riĉenhava, ĝenerale oni akceptis la uzadon en beletrio de hegemoniaj eŭropaj lingvoj sed kelkaj voĉoj leviĝis por la lokaj lingvoj, kies ĉefa defendanto estis la niĝeria verkisto *Obiajunwa Wali*, kiu plej klare kaj verve esprimis sian ideon pri la afrika literaturo rilate la kreolingvon. Laŭ *Wali*, afrika litera-

turo nepre estas tiu kreita en la gepatraj lingvoj, tial ke tiu verkita en eŭropaj estas legebla nur de tre malmultaj homoj, kaj ĉiuj lingvokomunumoj rajtas disvolvi beletron en sia lingvo. Aldone li taksis la afrikan beletron eŭroplingvan sterila, kreivmanka kaj frustra. *Wali* konsciis pri la enormeco de la tasko, oni devis nepre ege labori kaj pripensi, kaj forĵeti egocentrismon por havigi al tiuj lingvoj taŭgajn rimedojn. Sed la ĝenerala opinio malkonsentis al la postulatoj de *Wali*, *Chinua Achebe* klare akceptis la rangon de la angla en afrika beletrio, *Wole Soyinka* ne taksis taŭga la joruban por siaj teatroverkoj, kaj *Ngũgĩ* mem emis uzi la anglan pro ties riĉa vortprovizo.

La konkludoj de la konferenco ne estis unuanimaj, sed la organizantoj aperigis deklaron, kie interalie oni mencias ke «pli bonas transliteri la sentojn pensitajn kaj travivitajn en la anglan ol en la denaskan lingvon». La postan jaron *Wali* prikomentis tiun frazon: «Transliteri, kio estas tio? Tiu konkludo estas naiva, stulta kaj malakceptebla». Ankoraŭ *Ngũgĩ* ne venis al konsento kun *Wali*, sed la semo kuŝis en lia animo.

Turnopunkto kaj rigardo al la denaskaj lingvoj

Makerere ne ŝanĝis lingvoelekton de *Ngũgĩ*, sed *Wali Obiajunwa* plantis la semon, kiu iom post iom burĝonis ĉe *Ngũgĩ*. *Wali* foje «ĵetis» defion al la kenjano, kiu zorge pensigis lin. «Se vi skribas angle, via patrino ne povos legi viajn librojn». *Ngũgĩ* atente ekzamenis sian kontraŭdiron, profunde senti afrikan identecon kaj pledi por malkolonia sinteno beletrio esprimi sin per kolonia eŭropa lingvo.

Post kelkaj jaroj li entreprenis senturnan vojon, kiu venigis lin al dubranĉa agado favore al la

lokaj lingvoj, unu branĉo estis la scienca, esplora, disvastiga, kaj alia: originala produktado en la kikuja. Li malakceptis la konsilojn de Sengor «Injekti nigran sangon en la francan literaturon» kaj de Achebe «La angla, nova angla, kiu supozas komuniĝon kun la antaŭuloj estas taŭga portilo por la sargo de la afrika travivaĵo».

Male, Ngŭgĩ ekiris nefacilan vojon al kikuja beletra sinesprimmo, li agnoskis jarojn poste kiel penige estis komence flankenlasi la anglan kaj ellabori sian kikuja skribmanieron. «La kikuja havas ion glitan. Mi skribis kaj postajn tagojn mi konstatadis, ke mi volis esprimi ion alian. Mi ofte sentis la tenton forlasi tiun klopodon, tamen forte enestis ĉe mi tiu kikuja luktovoĉo». Kaj li trovis belan voĉon en kaj per sia lingvo. Tiu komenca streĉo malaperis, kreado en la kikuja alportis al li liberecon, «liberecon kiun mi ne sentis en mia komenco kiel verkisto». Kiel fakulo pri revigligo de malpliigitaj lingvoj li prelegis vaste tra la mondo. Foje li prelegis en Novzelando, kaj post la prelego ĉeestanto el la publiko komentis al Ngŭgĩ, ke «Vi parolis ne pri la afrikaj lingvoj, sed pri la maoria». Same okazis kun samea publiko.

Jen la vojo kaj postlasaĵo de pionira, verva kaj kuraĝa aganto, kiu faris longedaŭran kaj plensignifan alporton por la digneco kaj disvolvo de la marginaj denaskaj lingvoj. ■

Kelkaj kernaj fragmentoj

Ĉio komenciĝis antaŭ cent jaroj, en 1884 la eŭropa kapitalista potenco sidiĝis en Berlino kaj dividis en multaj kolonioj kontinenton konsistantan el multaj popoloj, kulturoj kaj lingvoj. Ŝajnus, ke la destino de Afriko ĉiam ligiĝis al la decidoj de la okcidentaj metropoloj ĉirkaŭ tablo de intertraktado. En Berlino oni decidis igi la memstarajn komunumojn kolonioj; freŝdate ĉe tiuj samaj tabloj de Parizo, Londono aŭ Lisbono oni debatis krei novkoloniojn ene de tiuj landlimoj. (...)

Kaj la afrikaj popoloj, kiel kolonio aŭ novkolonio, estiĝis difinitaj aŭ memdifinis sin laŭlingve, nome, kiel, franc-lingva landaro, angla-lingva landaro kaj portugallingva landaro. Malfeliĉe, verkistoj iĝis difinitaj, kaj ili mem definis sin laŭ la lingvoj altruditaj de imperiismo. Eĉ kiam ili volis prezenti radikajn kaj afrikemajn sintenojn, ili konsideris kvazaŭ aksiomo, ke la revigligo de la afrika kulturo kuŝis ĉe la eŭropaj lingvoj. Mi ja bone scias tion proprasperte.

Ni povus demandi nin, kial afrika aŭ iu ajn verkisto devas havi tiun obsedon enŝovi elementojn el sia denaska lingvo por riĉigi lingvojn de aliuloj. Kial akcepti tiun sintenon kiel propran mision. Ni neniam starigis la demandon al ni: kiel riĉigi niajn lingvojn? Kiel nutri nin el la heredaĵo de la lukto por humanismo kaj demokratio en aliaj epokoj kaj lokoj por riĉigi nian literaturon? Kial ne havi en afrikaj literaturoj Balzac, Tolstoj, Ŝoloĥov, Brecht, Lusin, Neruda, Eskilon, Einstein (...)?

La konsekvenco de 1884 efektiviĝis pere de glavo kaj kuglo. Sed al glava kaj kugla punkto sekvis la kreta kaj tabula mateno. Post la korpa perforto sur la batalkampo venis la psikologia perforto en la klasĉambro. La unua perforto montris sin sovaĝa, tiu dua multe pli malmola, Cheikh Hamidou Kane plej lerte priskribis ĝin: scii mortigi plej efike, kaj kuraci per sama arto.

Kampanoj konsideris ĉi tiujn lingvojn, naciajn havaĵojn de Afriko. La kampanoj ne taksis kontraŭdira paroli siajn lingvojn kaj aniĝi en pli granda naciogeografia membraro aŭ en granda kontinento. (...) Tiuj homoj daŭre parolis volofe, haŭse, jorube, iboe, arabe, amhare, svahile, kikuje, kimbundue (...), kaj tio ne kaŭzis rompiĝon de multetna ŝtatoj.

BIBLIOGRAFIO

Asun Garikano. Erlea literatur revuo, numero 4. 2011. *Euskaltzaindia*.

U. Urrutikoetxea https://www.naiz.eus/en/hemeroteca/gaur8/editions/gaur8_2025-09-13-07-00/hemeroteca_articles/afrikar-idazleek

Ferriòl Macip <https://www.jornalet.com/nova/23327/es-ngugi-wa-thiongo-figura-clau-de-la-literatura-africana>, <https://www.jornalet.com/nova/11845/lescrivan-ngugi-wa-thiongo-ven-de-recebre-lo-xxxi-premi-internacional-catalonha>
Vikipedio en kataluna, eŭska, hispana, franca kaj angla lingvoj.

Milei, koŝmaro de la aŭtoktonaj popoloj

Guy Zurkinden

El artikolo de la svisromanda gazeto *Le Courier*, 9an de januaro 2025.
Ĝin tradukis, helpe de DeepL-tradukilo uzanta AI, Nicole Margot.¹



Ekde unu jaro privataj entreprenoj intensigas premojn sur la praaj teroj de la aŭtoktonaj komunumoj.

La argentina prezidento pli kaj pli atakas la aŭtoktonojn. En la nordoriento de la lando la mimbioj² provas defendi siajn minacatajn terojn.

Por la mimbioj, la unua jaro de *Javier Milei* en la registaro fariĝis koŝmaro, atentigis la Ĝeneva Movado por Kunlaboro Internacia (MKI). Ekde kiam la ekstremdekstra prezidento ekoficis, entreprenoj kaj privataj plifortigis la premon sur

la prapopolajn terojn de ĉi tiu komunumo, kiu nombras ĉirkaŭ 10000 membrojn en la provinco Misiones en nordorienta Argentino. La situacio plimalboniĝis pro la nuligo, la 10-an de decembro, de la leĝo 26.160, kiu estis fundamenta por la agnosko de la his-

1. La artikolo kaj la intervjuo aperis la 9an de januaro 2025 en la svisromanda gazeto *Le Courier*. La tradukinto povis kontroli en aliaj artikoloj, ke la situacio priskribita antaŭ monatoj restas aktuala kaj certe pliserioziĝas. Oni povas supozi, ke la lastaj elektoj, ege favoraj al *Javier Milei*, ne plibonigos la situacion de la argentinaj aŭtoktonoj.
2. Subgrupo de la gvarania etno.

toriaj teritorioj de la argentinaj prapopoloj.

Eĉ ne semajno da ripozo

«Ĉio akceliĝas. De kiam *Javier Milei* ekregis, individuoj, malgrandaj bienposedantoj kaj lignoekspluatataj kompanioj pligrandigis siajn enirojn en la terojn de la mimbioj. Ili scias, ke ili povas fidi je la subteno de la registaro,» diris *Florence Nuoffer*, aktivulino de MKI. Jam de pluraj monatoj alarmas *l'Equipe Misiones des pastorales autochtones, Emipa* (Teamo de la indiĝenaj paŝtistoj de *Misiones*), loka partnero de MKI, kiu subtenas la mimbiojn de ok jaroj.

«Ne pasas semajno sen ke nova okazaĵo perturbas la pacon kaj trankvilon de la mimbio popolo. Truduloj senĉese envenas, provante malstabiligi la lokanojn per minacoj kaj insultoj, cele al konstruaj projektoj, privataj rezervejoj, konstrulaboroj en privataj rezidejoj», raportis la organizo komence de novembro 2024, menciante atakojn kontraŭ la komunumo *Mbokajaty* en la sudokcidento de la provinco.

En ĉi tiu streĉa kunteksto, la nuligo de la leĝo 26.160 sonis kiel fulmotondro. «Tiu dispono grave minacas familiojn defendantajn proprajn rajtojn sur la teroj de siaj prauloj», atentigis la argentina ĉiutaga gazeto *Página 12*. Malrespekto al la Federacia Konstitucio, kiu agnoskas la «etnan antaŭekziston» de indiĝenaj popoloj kaj garantias «komunumajn posedaĵojn kaj proprieton» de iliaj tradiciaj teroj, grandaj partoj de tiuj teroj estis dividitaj kaj venditaj de la federacia ekzekutivo aŭ de la provinco.

En 2006, sub la registaro de *Nestor Kirchner*, la provizora leĝo 26.160 estis enkondukita kaj reprezentis gravan paŝon antaŭen

por indiĝenaj popoloj. Kvarfoje pludaŭrigita, la leĝo ekigis procezon deklaritan «urĝa», kun la celo limdifini kaj rekonigi iliajn teritoriojn, dum ĝi suspendis eldomajn forpelojn dekretitajn de la tribunaloj.

«La apliko de la leĝo certe estis malrapida kaj neperfekta: el la 135 mumbiao-komunumoj en la provinco *Misiones*, nur 90 havis siajn terojn censitajn. Kaj nur 30 el ili akiris terposedatestojn – ofte por areoj tro malgrandaj por provizi familiojn per la necesaj vivtenaj rimedoj, kondamnataj ilin al malriĉeco», klarigis *Florence Nuoffer*. Malgraŭ ĉi tiuj mankoj, la nuligo de tiu leĝaro markas teruran retroiron, survoje al rekomenco de perforta translokado. «Indiĝenoj nun vivas kun timo,» resumis la aktivulino de MKI.

La antaŭeniĝo de Arauco

La dekreto decidita de *Javier Milei* la 10-an de decembro aparte favoros la projektojn de kompanio bone konata de la mimbioj: la multnacia kompanio *Arauco*. Aktiva en ĉirkaŭ 30 landoj, ĉi tiu kompanio bazita en Ĉilio posedas 10% de la tero en *Misiones*. Sur tiuj 230 000 hektaroj, ĝi laboras por anstataŭigi la praarbaron per pinarbaraj kaj eŭkaliptaraj plantejoj. «Iuj komunumoj estas ĉirkaŭitaj de tiuj unukultivoj, kiuj sekigas la grundon kaj poluas ĝin per la intensa uzo de sterkoj kaj pesticidoj», diris *Florence Nuoffer*.

Temas pri tragika evoluo por la biodiverseco, sed ankaŭ por la kulturo kaj vivtenado de la gvarania popolo, kiu zorgas rikoltas manĝaĵojn, kuracajn plantojn kaj lignon el ĉi tiu subtropika arbaro. En la lastaj monatoj, *Arauco* – kies plantejoj en *Misiones* ricevis la FSC-etikedon³ de «daŭripovo» – plifortigis la premon,



provante aĉeti la teron de la mimbioj kontraŭ la konstruado de puto aŭ konekto al la elektroreto. Tion akompanis sistema kalumni-kampanjo celanta la indiĝenan komunumon kaj ĝiajn subtenantojn, inkluzive de *Emipa*.

"La gardantoj de la arbaro"

«Malgraŭ ĉi tiu kreskanta malamikado, la gvarania popolo konservas la forton por batali», rimarkigis *Florence Nuoffer*. Ŝi citis la ekzemplon de *Puente Queimado 2*, en la mezoriento de *Misiones*. Post kiam la tero de la tieaj loĝantoj estis detruita

3. *Forest Stewardship Council* estas internacia NRO, kies misio estas antaŭenigi ekologian, socian kaj ekonomian arbaran administradon. La labelo FSC, kiu estas konsiderata ekologia kaj ankaŭ socia-media etiketo, provizas uzantojn per iloj por antaŭenigi respondecan arbaran administradon.

en 2022 de incendio, kiu disvastigis el la unukultivoj de *Arauco*, la membroj de ĉi tiu malgranda indiĝena komunumo decidis rebati. Dum la multnacia korporacio volis replanti milojn da pinoj ĉiakoste, la indiĝenoj ekrevigligis la indiĝenan arbaron kun la subteno de la NRO *Greenpeace*.

Por pli efike defendi siajn minacatajn teritoriojn, la mimbioj laboras por unuigi siajn 135 komunumojn disajn tra la provinco. Por tiu celo, ili laboras por plifortigi sian tradician politikan organizon: la *Aty Ñeychyrò*, grandan asembleon, kiu regule kunigas reprezentantojn el ĉiuj ĉi tiuj entoj. Logistika subteno por la *Aty Ñeychyrò* estas unu el la ĉefaj komponantoj de la projekto financata de MKI.

Alfrontante prezidenton, kiu faris el ĉensegilo sian simbolon, la mimbioj reprezentas la lastan bastionon, kiu protektas la indiĝenan arbaron, emfazis *Florence Nuoffer*. «Pli ol iam ajn, ili bezonas nian subtenon,» konkludis la aktivulino.

«La demokratia pakto estis rompita»

Ankaŭ mapuĉoj estas koncernataj



Orlando Carriqueo

Laŭ *Orlando Carriqueo*, mapuĉa “*werken*” (mesaĝisto), la sistemaj atakoj de *Javier Milei* kontraŭ indiĝenaj popoloj estas parto de kontraŭdemokratia projekto celanta favori ekstraktadajn kompaniojn. Ĉi tiu gvidanto de la mapuĉa komunumo, kiu estas historie signifrolando en la socia rezisto en Argentino kaj Ĉilio, respondis demandojn de *Le Courrier* el la patagonia provinco *Río Negro*, kie li loĝas.

Kia estas la sinteno de prezidento Milei al indiĝenaj popoloj?

Orlando Carriqueo: La nova prezidento sekvas politikojn, kiuj respondas al la deziro de la ekstrakta industrio.

Precipe, li kreis reĝimon, konatan kiel RIGI⁴, kiu estas ekstreme favora al kompanioj okupiĝantaj pri la ekspluatado de ligno, nafto, gaso, litio kaj mineraloj. Por faciligi la kontrolon de la tero fare de ĉi tiuj multnaciaj kompanioj, *Javier Milei* samtempe plifortigas atakojn kontraŭ indiĝenaj popoloj. La ekzekutivo malmuntis la Nacian Instituton pri Indiĝenaj Aferoj, voĉdonis kontraŭ rezolucio de UN celanta garantii aliron al justeco por indiĝenaj popoloj, kaj nuligis la leĝon 26.160 celantan agnoski iliajn teritoriojn. *Javier Milei* ankaŭ instigis eldomigojn kaj kuraĝigis perforton: agresantoj nun scias, ke ili povas agi senpune.

Kiuj estos la konsekvencoj de la nuligo de Leĝo 26.160?

Unue, ni devas reliefigi la cinismon de ĉi tiu registaro, kiu nuligis ĉi tiun leĝon la 10-an de decembro, en la Internacia Tago de Homaj Rajtoj!

En la sekvaj tagoj, juĝistoj ordonis la elpelon de pluraj indiĝenaj komunumoj. Tio inkluzivas la provincon *Río Negro* en la sudo de la lando, kie loĝas granda nombro da mapuĉaj familioj.

Ĉi tiu decido pliintensigos la perforton kontraŭ ili. En Patagonio, ekzemple, kompanioj jam ekzercas fortan premon sur niajn terojn por eltiri nafton, gason, lition, oron kaj arĝenton.

4. Indigenous Resources Initiative

Kiel vi respondas al tiuj atakoj?

Ni prezentis plendojn kontraŭ la nuligo de Leĝo 26.160, kiu malobservas la Argentinan Konstitucion kaj internaciajn konvenciojn protektantajn la rajtojn de indiĝenaj popoloj, ĉe la Interamerika Komisiono pri Homaj Rajtoj, kiu estas parto de la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj (OAS).

Ni rezistas la elpelojn surloke kaj en la tribunaloj, daŭrigante longan tradicion de rezisto. Ni daŭrigas la procesojn pro genocido iniciatitajn de membroj de la mapuĉa komunumo kontraŭ la argentina ŝtato. Inter 1879 kaj 1884, ĉi-lasta lanĉis militan kampanjon celantan ekstermi la indiĝenajn popolojn de Patagonio. Ĝi rezultigis milojn da mortoj kaj deportoj.

La politiko de Milei celas ne nur indiĝenajn loĝantarojn.

Ĉi tiu ekstrem-dekstra registaro atakas ĉiujn homajn kaj demokratiajn rajtojn en la lando. Kaj por fari tion, ĝi ne hezitas uzi politikan perforton.

La 1-an de januaro, *Javier Milei* dekretis, ke la armeo povus interveni por sekurigi minadlokojn kaj subpremi socian proteston. Unuafoje ekde la fino de la milita diktaturo, la armitaj fortoj povos ludi rolon en la interna sekureco de la lando. Tio estas rompo kun la demokratia pakto sigelita fine de tiu malluma periodo. ■

Prezidento *Catherine Connolly* kaj la Irlanda Lingvo

Seán Ó Riain



La 24an de oktobro 2025 *Catherine Connolly* estis elektita kiel la 10a Prezidento de Irlando, kaj la tria ina Prezidento de la lando. Ŝi ricevis preskaŭ milionon da voĉoj, pli ol 63% de ĉiuj donitaj voĉoj.

La ofico de Prezidento de Irlando estas plejparte ceremonia, kun tre malmulta povo. La Prezidento povas plusendi leĝprojekton al la Supera Kortumo por testi ĉu, ĝi konformas al la Konstitucio de Irlando, kaj povas rifuzi dissolvi la Parlamenton se la ĉefministro perdas la subtenon de plimulto en la Parlamento – la Prezidento povas alvoki la estron de la Opozicio por provi formi registaron. Ĉi lasta povo neniam estis uzata.

Kvankam plejparte sen formalaj povoj, la Prezidento de Irlando povas influi la publikan opinionon, ĉar liaj/ŝiaj deklaroj estas vaste raportataj en la amaskomunikiloj. *Michael D. Higgins*, kiu estis Prezidento de Irlando de 2011 ĝis 2025, havis tre maldekstrajn vidpunktojn, kaj ne hezitis disko-

nigi ilin. La nova Prezidentino, *Catherine Connolly*, plejparte dividas la maldekstrajn vidpunktojn de la antaŭa Prezidento. Rimarkinde estas, ke ambaŭ forte kondamnis Israelon tra la jaroj, kaj montras malmultan komprenon pri la bezono de tiu lando defendi sin kontraŭ konstantaj atakoj de islamaj ekstremistoj.

Pozitive, kaj prezidento *Higgins* kaj prezidento *Connolly* estas fortaj subtenantoj de la irlanda lingvo. *Catherine Connolly* ne estas denaska parolanto. Kiel ĉiuj irlandanoj, ŝi lernis iom da irlanda lingvo en la lernejo. Tamen, kiam ŝi fariĝis urbestro de *Gaillimh/Galway*, ŝi decidis serioze studi la lingvon kaj fariĝis flua parolanto. Ŝi konstante uzis la irlandan lingvon publike, kaj dum la pasinta jaro ŝi estis prezidanto de la Parlamenta Komitato pri la Irlanda Lingvo kaj la Irlandlingva Komunumo.

Kiam la antaŭa prezidanto de la Eŭropa Komisiono, *Jean-Claude Juncker*, alparolis la Irlandan Parlamenton dum sia vizito en 2019, *Catherine Connolly* estis la sola parlamentano, kiu faris deman-

dojn al li en la irlanda, tiel montrante la samtempan interpretad-sistemon de la Parlamento. Tiu-tempe ŝi estis kritikata de malpli kleraj politikistoj pro «*montrado de malbonaj manieroj parolante irlande, kiam ne-irlanda persono ĉeestis*»! La kritikistoj tute preteratentis la fakton, ke la Komisiono de *Juncker* tiutempe dungis pli ol 100 irlandalingvajn tradukistojn, kaj atendus aŭdi la irlandan lingvon pli vaste uzata en la Irlanda Parlamento (kie pli ol 40 TD-oj parolas ĝin flue).

Tuj kiam ŝi estis elektita Prezidento, *Catherine Connolly* anoncis sian intencon igi la irlandan la laborlingvo de sia ofico. La reguligita uzo de la irlanda lingvo fare de la unua civitano de Irlando, kaj pli grave, ŝia decido igi la irlandan la laborlingvo, estas tre bonvena kaj grava subteno por la lingvo. Ĝi konstante kreskis en populareco dum la lastaj jaroj kaj estis politika faktoro en la elekto de *Connolly*: ŝia kontraŭulino, *Heather Humphreys*, ne parolas la irlandan, kaj tio pruvigis grava problemo por ŝi dum la balotkampanjo. ■

Tuj kiam ŝi estis elektita Prezidento, *Catherine Connolly* anoncis sian intencon igi la irlandan la laborlingvo de sia ofico. La reguligita uzo de la irlanda lingvo fare de la unua civitano de Irlando, kaj pli grave, ŝia decido igi la irlandan la laborlingvo, estas tre bonvena kaj grava subteno por la lingvo.

«Kiam la stabileco de la lingvo reduktiĝas, tiu ĉi Fariĝas fakultativa, suplementa»

Conchúr Ó Giollagain, spertulo pri lingva planado

Arantxa Iraola

Traduko fare de Nikolas Xil Carvalho de artikolo originale aperinta en *Berria* la 26-an de julio 2025.

Ó Giollagain defendas alian paradigmon en la politikoj por subteni la minorigitajn lingvojn, kiu prikonsideru pli la vivantajn lingvajn komunumojn. Kiam nun feblas la lingvonestoj¹ liaj vortoj estas pripensigaj.

Conchúr Ó Giollagain naskiĝis en Dublino en 1966. La skotgaela kaj la irlandgaela estas liaj plej proksimaj minorigitaj lingvoj, sed li estas referenca spertulo pri lingva planado ĝenerale kaj pri kulturo kaj sociologio de la minorigitaj lingvoj. Antaŭ nelonge li estis en Eŭskio kaj en la konversacioj, kiujn li havis, li facile rimarkis la eĥon de la rezultoj de

la enketo *Norantz doa euskara? Hego Euskal Herria 2036 proiektzio demolin-guistikoa*² farita de la enketentreveno *Siadeco* laŭ mendo de UEMA³. Fakte, unu el la konkludoj de tiu enketo estas, ke en 2036, se oni ne prenas efikajn rimedojn por bremsi la nunan evoluon, la lingvonestoj, tio estas la geografiaj areoj kun supereco de la eŭska, estos praktike malaperintaj. Por lukti kontraŭ tiu malapero, al *Ó Giollagain* klaras, ke la vojo de la porlingvaj politikoj devas ŝanĝiĝi, jen en Eŭskio jen en multaj aliaj mondpartoj. Li konsideras, ke multaj el la lingvaj politikoj, kiujn oni enkondukas nun, neas la realon, kaj ke ili intencas solvi per suprajaj rimedoj problemojn kun tre profundaj radikoj. Aŭtune li partoprenos en la internacia konferenco pri lingvonestoj, kiun oni okazigos en Aspejtio.

Lastatempe disvastiĝis maltrankvilo, ĉar enketo konfirmis la jam ekzistantan zorgon: la lingvonestoj de la eŭska estas febliĝantaj. Kia estas tiu ĉi perdo? Kial tiom gravas la lingvonestoj por la lingvoj?

Ju pli granda estas la denseco de parolantoj en konkreta geografia areo, despli forta estas la lingvo. La nuntempa defio de la minorigitaj lingvoj en Eŭropo estas, ke zonoj de granda parolantardenseco estas malaperantaj, krizo, kiu ekminacas la ekziston mem de la minorigitaj lingvoj. Kio okazas en Eŭskio estas okazanta en aliaj lokoj. La spertoj de la moderneco kaj la postmoderneco kaŭzis tre gravajn problemojn por la ekzistado de la minorigitaj komunumoj, kaj la porlingvaj politikoj ne estas adekvataj por alfronti tiujn problemojn.

Kial ili estas maladekvataj?

Estiĝis filozofia debato en la socilingvistiko. Ĉe unu flanko staras tiuj zorgantaj

1 'Lingvonesto' estas nia propono por traduki la eŭskan 'arnasgune' de la originalo. 'Arnasgune' signifas laŭlitere 'spirejo'. Ĝi estas termo uzata en la eŭskaj socilingvistiko kaj porlingva movado por paroli pri la areoj, en kiuj oni povas trankvile kaj senprobleme paroli eŭske.

2 Kien iras la eŭska lingvo? Demolingvistika projekcio de Sudeŭskio en 2036.

3 *Udalerri Euskaldunen Mankomunitatea*. Municiparo de Eŭsklingvaj Urboj.



ANDONI CANELLADA/FOKU

pri la ekzisto kaj kontinueco de la parolantaro; ĉe la alia, tiuj, kiuj impulsas la identecan kaj simbolan disvolvon de la lingvo. Plej ofte, speciale temas pri tio, ke la ŝtatoj stimulas porlingvaj politikojn, ili sentas, ke pli facilas fari simbolan stimulado de la minorigitaj lingvoj ol alfronti la politikajn kaj sociajn malfacilaĵojn ekzistantajn en la lingvaj komunumoj. La kialo estas, ke por la registaroj kaj publikaj institucioj ĝenerale pli facilas regi la asociojn, kiujn ili subvencias. Fundamente do en la nunaj politikoj por la minorigitaj lingvoj oni ekskludas la malaperon de la parolantarkomunumoj kaj pleje emfazas la simbolan stimulado de la lingvo.

Kiajn politikojn oni faras per tia simpla stimulado?

Praktike, la politikaj institucioj metas monon en la edukon, la

amasmediojn, la novajn teknologiojn kaj la arton por klopodi favore al la lingvo. Oni investas multe en tiaj aktivaĵoj. En Irlanda Respubliko, ekzemple, jam de kvar generacioj oni funkciigis planojn de porlingvaj politikoj, kiuj foruzis milionojn kaj milionojn, sed malfacilegas trovi tie iniciatojn kaj politikojn por fortikigi la ekzistantajn lingvajn komunumojn. Ekzemple, mankas rimedoj por subteni la kampan logantaron aŭ por doni ŝancojn al la tiea logantaro... Post kvar generacioj, post cent jaroj de porlingva planado malfacilas eltrovi politikojn specife pensitajn por lingvaj politikoj, por ke la komunumoj pluvivu. En tiu ĉi konteksto la organizoj, kiuj subtenas la minorigitajn lingvojn, bremas sian emon postuli pli, kaj ili kontentiĝas pri la nuna strukturo, ĉar ili ricevas monon kaj institucian subtenon. Tiel ili parte helpas, vole aŭ nevole, en tiu ĉi kamuflad-operaco, kiun efektiv-

igas la registaro, kaj la normala civitano ne vidas tion, kio envere okazas. Kaj normale, kiam oni faras tiajn simbolajn politikojn en Eŭropo, la partioj de la majoritata lingvo akceptas aŭ toleras ilin, ĉar ili scias, ke ĉio estas simbola kaj iras nenien.

La porlingvaj politikoj bazitaj sur la edukado, la novaj teknologioj kaj la amasmedioj estis decidaj por la pliigo de parolantoj. Se kelkaj validaj politikoj helpis en tio kaj funkciis, kiel tiom gravas ŝanĝi la disvolvado de la politikoj?

Certe estas malsamaj tipoj de parolantoj en minorigitaj lingvoj. Sed ni devas nin demandi: Kiuj estas la plej produktivaj? Kiuj

Conchur O Giollagan.

kreas vivon por la lingvo? Normale, en areoj de granda parolantdenseco, la lingvo pli vivas, la parolantoj protektas sin reciproke kaj subtenas la kontinuecon de la kulturo... Kiam la stabileco de la lingvo reduktiĝas, tiu ĉi fariĝas fakultativa, suplementa. Ĉiuj parolant-klasoj gravas, kaj ĉiuj subtenindas fare de la publikaj institucioj, sed oni devas alfronti la realon: Ekzistas malsamaj tipoj de parolantoj, kaj ili bezonas malsamajn subtenmanierojn. Kaj nuntempe la plej granda eraro de la porlingvaj politikoj estas, ke la porlingva politiko profitigas nur unu parton. Tio implicas, ke en la lingvonestoj oni sentas sin malprotektata, ĉar ili bezonas politikojn, kiuj prenu ilin kiel celo de tiuj porlingvaj politikoj.

Sed ĝis kiu punkto la lingvonestoj estas nun lingvonestoj? En tiu ĉi tutmondiĝa epoko, kun la ciferecigo de la vivstilo, la infanoj kaj adoleskuloj naskiĝintaj kaj kreskintaj en lingvonesto pasigas horojn en fremdaj lingvoj ekde sia malgranda aĝo. Kiel alfronti tion?

Jen bona demando, jes: Eĉ la grandaj lingvoj hodiaŭ, ene de la tutmondiĝo, vidas dinamikojn, kiuj apartenas pli al la minorigitaj lingvoj, ĉar en la cifereca mondo la angla dominas. Ĉiuj lingvoj en la mondo havas rilaton iel diglosian kun la angla, ĉiuj. Kaj poste minorigita lingvo havas diglosian rilaton kun la ĉirkaŭaj lingvoj kaj ankaŭ kun la angla, tio estas, ion similan al duobla diglosio. Sed jes, ĝi estas bona demando, ĉar ĝi montras la naivecon de la establita lingvaj politikoj. La nunaj politikoj, suprajaj, ne agantaj sur la radikaj problemoj, estas politikoj bazitaj sur simplaj faktoroj de la lingva stimulado. Ĉar influi en la sociaj dinamikoj pli malfacilas ol proponi aliajn rimedojn. La plej fortaj minorigitaj lingvoj: la kataluna, la eŭska kaj la kimra, eĉ estas en krizo, kaj tio signifas, ke io

misas en la diagnozo kaj oni devas esti honesta kun la parolantoj, kiuj vidas grandan diferencon inter tio, kion oni diras, kaj tio, kio okazas. La eŭskoj havas, parte, bonŝancon kompare kun aliaj lingvaj komunumoj, ĉar en Eŭskio estas organizoj, kiuj alfrontas la okazantaĵojn: Mi estis kun membroj de la *Sozio-lingvistika Klusterra* kaj de *UEMA*, ekzemple, kaj ni organizas nun internacian konferencon por aŭtuno. Tiu renkontiĝo estos tre grava por identigi la ĉefajn defiojn, kiujn ni alfrontas nuntempe, kaj prilabori novajn strategiojn.

Ĉu tiu tendenco kaŝi la realon trudi sin en la ĉefaj eŭropaj institucioj subtenantaj la minorigitajn lingvojn?

Ne rigardi rekte, kio envere okazas, signifas esti neanto de la realo. Tio estas, ekzemple, kio okazas en Irlanda Respubliko. La neado baziĝas sur falsa optimismo: La homoj bezonas bonajn novaĵojn, sed tiu optimismo bezonas kelkajn bazojn, kaj kiel povas la porlingvaj politikoj esti optimismaj, se ili forneas la realon? Nei la malfacilaĵojn, kiujn havas la parolantoj, konkrete la atentomanko je la problemoj, kiujn ili havas en la lingvonestoj, estas toksa optimismo, kiu neas la realon kaj malplibonigas la situacion. Akiri novajn parolantojn, ekzemple, estas pozitiva atingo, sed tio kunhavas aliajn defiojn, kiujn oni ankaŭ devas alfronti. Se oni emfazas nur en tiu toksa optimismo, en Eŭskio, ekzemple, ne estos lingvonestoj, ĉefos la kulturo de la majoritata lingvo, la hispana, kaj la eŭska estiĝos hobio por la hispanparolantoj. La fakto, ke la eŭska estiĝos iel hobio feliĉigos multajn, kiel faras la sportoj, sed oni devas demandi al la eŭskparolantoj, se ili volas vivantan lingvon aŭ hobion. La porlingvaj politikoj nuntempe iras tiun vojon de la hobio, ne tiun de vivanta lingvo.

Vi menciis kritike Irlandan Respublikon. Kiun instruon oni devas preni el la vojo farita en Eŭskio?

La generacio, kiu nun vivas en la lingvonestoj estos certe la lasta. Ekde 1990 la lingvonestoj krizas, sed la irlanda porlingva politiko estis neisma en tiu senco: Oni ĉiam emfazis la neceson de novaj parolantoj, kaj tiu estas la filozofio, kiu koloniigis la lingvonestojn. Tiu estis vojo al la malvenko, pro kiu tiu ĉi estos la lasta generacio, kiu vivos en la gaela. Ne tiu, kiu uzos la gaelan unu fojon tage, sed tiu kiu vivos gaele. La organizoj por stimulado de la gaela multegas kaj vivos pli longe ol la gaela komunumo; estas absurde, sed neniu kuraĝas tion diri, ĉar oni timas perdi la ricevatajn subvenciojn. Spite al tio, ke oni estas ŝtato kaj faras lingvaj politikojn de cent jaroj, la vera gaela komunumo estas mortanta.

Ankaŭ tie ĉi, laŭ la lastaj enketoj, la lingvonestoj estas en danĝero de forpereo. Kion oni povas fari?

La gaela, kiel vivanta lingvo, estas multe pli malforta ol la eŭska. Tie, en la lingvonestoj, restas nur 20 000 parolantoj, tiuj, kies unua lingvo estas la gaela, kaj tiuj, kiuj vivas gaele. 1,7 milionoj da homoj asertas esti kapablaj iom paroli. Ni ne scias, ĉu ili scias la lingvon, sed ili diras, ke ili iom scias. Kaj tiu ĉi estas la rezulto de centjara simbola lingva politiko. En Skotio, siaflanke, la parolantoj en la lingvonestoj estas 11 000. Oni devas rigardi la realon fronte. La bato, kiun donas la realo kontraŭ la eŭskan, ne estas tiom granda. Sed gravas fari socie, ekonomie kaj teritorie vivipovajn lingvonestojn; tiel, kiel ili senhomiĝas; tiel, kiel ili iras al la skota aŭ irlanda tendencoj, la situacio fariĝas pli kaj pli malfacila. Eble la aŭtoritatoj de Eŭskio disdegne ignoras tion, kio okazas en Irlanda Respubliko: «Ni ne statas tiel», ili povas diri. Sed tie ĉi oni faras aferojn similajn al tiuj farataj tie. ■

Memore al Uwe J. Moritz

En marto de 2024 forpasis Uwe J. Moritz, agadema esperantisto, grava aktivulo en la movado favore al la platdiĉa lingvo, redaktoro dum multaj jaroj de **Etnismo** kaj kunfondinto de IKEL. En la numero 114, decembro de 2024, Nicole Margot dediĉis omaĝan paĝon al la multfaka agado de s-ro Moritz. En tiuj-ĉi paĝoj tri esperantistoj rakontas kelkajn siajn travivaĵojn kun li.



Uwe Joachim Moritz: kion mi memoras pri li

Ulrich Brandenburg

Mi konatiĝis kun Uwe jam kiel infano, kiam li studis en mia hejmurbo *Münster*. Li regule venis al la kunvenoj de la loka Esperanto-grupo kaj ofte gastis ĉe miaj gepatroj (fakte en 1964 kaj 1965 li eĉ iom helpis konstrui nian domon). Li tiam aktivis en diversaj Esperanto-forumoj, interalie kiel prezidanto de Germana Esperanto-Junularo. La jarfinaj renkontiĝoj de GEJ – tiam la Internaciaj Seminarioj, hodiaŭ nomataj Jarfina Esperanto-Semajno – multe profitis de liaj kontaktoj kaj lia serioza preparlaboro. Konstanta gasto tie dum multaj jaroj estis Ivo Lapenna, kiu kutime prelegis pri “juraj aspektoj de...” la aktuala temo. Uwe apartenis al la grupo, kiu preparis la transiron de la UEA-prezidanteco al Humphrey Tonkin dum la Universala Kongreso en Hamburgo 1974. La indekso de la verko “Hamburgo en Retrospektivo” (en kiu Lapenna poste prezentis sian vidpunkton pri la okazintaĵoj) alfabete listi-

gas lian nomon tuj post *Molotov* – iom duba honoro.

Dum tiuj jaroj Uwe pli kaj pli konsciis, ke la Esperanto-movado ne povas daŭripove sufiĉi al si mem. Lingva egalrajteco estas unu el la kernaj argumentoj por Esperanto, kaj tiu fakto igis lin interesiĝi pri la malgrandaj, ofte eĉ grandaj lingvoj suferantaj diskriminacion. Iun tagon lian aŭtomobilon ornamis ne nur la verda stelo, sed apud ĝi gluetiketo kun la eŭska flago (tiam malpermesita en Hispanio, kio alportis al li iom da problemoj ĉe la limo).

Mi ne plu scias, kiam li fondis **Etnismo**-n kaj la asocion IKEL¹, sed mi memoras la unuajn – stencilitajn, ĉar presado estus tro kosta – ekzemplerojn de la revuo. El lia vidpunkto lingvaj minoritatoj estas niaj naturaj aliancanoj – kaj Esperanto la natura ligilo inter ili. Li pravis, kvankam

la sukcesoj ĝis hodiaŭ ne abundas. Mi multon lernis de li, ankaŭ ĉar mi mem ĉiam interesiĝis pri lingvoj. Ke ankaŭ la nordgermana *Plattdeutsch* (kiun li esperantigis kiel “platdiĉa”) estas lingvo kaj ne nur dialekto de la altgermana, mi komence ne volis kredi. Al tiu lia hejma lingvo li poste dediĉis multon de sia nelacigebla energio: kelkaj liaj publikaĵoj en ĝi kaj pri ĝi estas troveblaj en la reto. Kiam por la Germana Esperanto-Kongreso 2019 en *Neumünster* ni elektis la temon “Lingvaj Minoritatoj” kaj registrigis tiun eventon kiel oficialan kontribuon al la Unesko-Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, mi lastfoje provis kontakti kaj inviti mian amikon Uwe, sed li jam ne povis reagi.

Uwe Moritz estis batalanto: energia, laborema, elokventa, kelkfoje obstina. Tia mi memoras lin. Sen li la etnisma movado inter esperantistoj verŝajne ne ekzistus. /UB

1 **Etnismo** fondiĝis la 10an de majo 1972 kaj IKEL en 1978,

Pri Uwe

Renée Triolle

Uwe estis inter miaj plej malnovaj kaj bonaj amikoj en Esperantujo. En la 60aj jaroj, kiam fera kurteno dividis Eŭropon, li helpis hungaran amikinon akiri aŭton (rarajon en tiu lando kaj tiu epoko). Eĉ se li ne estis riĉulo (ie ajn, instruistoj ne apartenas al la riĉa klaso), li kontribuis per sia mono al la pluvivo de Someraj Universitataj Kursoj: tiuj kursoj en Esperanto celis studentojn, proponis diversajn fakajn kursojn, eldonis poste oni eldonis la kursotekstojn. Li same persvadis Léon Hauregard el Belgio kaj min, Renée Triolle el Francio, engaĝiĝi en la aventuro, same alporti monon (kiu estis repagita iom post iom, kiam SUK finance pli bone fartis). Ni kunvenis laŭvice ĉu en Akeno (Germanio), kie loĝis Uwe, ĉu en Lieĝo (Belgio), ĉu apud Lille (Francio, kie mi tiam laboris; li ne perdis humuron kiam li proponis, ke ni kunvenu “en la mikrobejo”, t.e. la loĝejo de Léon, kiu tiam malsanis. Li poste investis sian energion en **Etnismo**-n.

Lia unua edzino, Mercedes, estis el Katalunio, sekve iliaj du gefiloj, Silvia kaj Marko, parolis katalune kun la patrino, germane kun la patro kaj Esperanton hejme. La kastilian ili lernis pli malfrue en publikaj kursoj. Silvia ĉiam parolis la ĝustan lingvon kun la homoj, Marko parolis la lingvon, kiu venis al lia kapo sed tuj korektis: ekz. li diris al mi ion en la germana, mi respondis en Esperanto «mi ne komprenas», kaj li tuj transiris al Esperanto.

Sed legantoj de **Etnismo** ĉefe interesiĝas pri la rilatoj de Uwe al etnoj. Li persvadis la membrojn ŝanĝi la nomon de la asocio al IKEL, argumentante, ke se ni pledas por uzo de etnaj lingvoj, ni ne favoru unu etnan lingvon, la plej fortan; sekve renomigis Internacia Komitato de Etnaj Lingvoj. Kaj li plu vivtenigis **Etnismo**-n: mi ne memoras en kiu jaro li ne plu diris, ke li estis germano sed nomis sin platdiĉa.

Li havis tre fortajn ideojn kaj konvinkojn en diversaj fakoj kaj ĉiam pretis laŭte defendi ilin, eĉ se iam li agnoskis, ke li devis subteni dum arango iun maoiston, kun kiu li forte batalis en alia kunsido.

Uwe malaperis, li lasas malantaŭ si konsciigon pri etnoj, etnaj lingvoj kaj **Etnismo**. Dankojn! /RT

Pasia Uwe (memoro el Eŭskio)

Rafael Blanco Arbe

Post mia lingva esperantistiĝo venis internacia esperantumado ekde fine de la okdekaj jaroj. Malkovro de buntaj, inspiraj kaj multspecaj kulturaj aranĝoj en la esperanta medio fascinis min. Revuoj, renkontiĝoj, asocioj, kongresoj, literaturo, muziko... kaj homoj.

Multajn virojn kaj virinojn mi ekkonis laŭlonge de mia esperanta vivo, homojn el malsamaj landoj, aĝoj, laboroj, ideoj kaj interesoj. Kelkaj el ili lasis en mi specialajn spuron kaj memoron.

Unu el tiuj estas la forpasinta en 2024 Uwe J. Moritz. Mi konis la revuon **Etnismo**, sed mi ne multe sciis pri IKEL. Universala Kongreso okazis en Valencio en la jaro 1993, kaj tiam mi interkonatiĝis persone kun Uwe. Dum tiu kongreso pli ol unu fojon ni partoprenis prelegojn kune, kafumis kaj interparolis. Li invitis min al oficiala tagmanĝo kun la registara sekretario pri lingvopolitiko de la valencia komunumo.

Ofte li komentis al mi pri sia simpatio al la kataluna kaj eŭska emancipiĝemaj movadoj, kaj rakontis anekdotojn pri siaj vizitoj al Eŭskio. Dum la IKEL kunsido de tiu UK okazis prezento pri la hispanŝtataj lingvoj. Joxemari Sarasua, Iñaki Gauna kaj mi faris skizan montron pri la eŭska lingvo kaj literaturo, kaj dum la demando vico post la prezento mi perfekte memoras, ke okazis akra disku-

to inter Uwe kaj la galega Antonio Alonso pro malsamaj politikaj sintenoj.

S-ro Moritz estis ja entuziasma, pasia kaj verva defendanto de la malpliigitaj lingvoj, kaj tiu “fajro” portis lin al tre engaĝiĝinta agado favore al tiuj kulturoj, pere de internaciaj asocioj, unue en AID-MK, kaj poste en IKEL, kies kunfondinto li estis en 1978. De 1972 li eldonis **Etnismo**-n, kies redaktoro li restis ĝis 2004.

En la esperanta movado li ludis gravan rolon ankaŭ kiel prezidanto de Germana E-Junularo inter 1961 kaj 1964, kaj inter 1965 kaj 1969. Eble Uwe estis unu el la kreantoj de tiu komplete rava “inventajo” Internacia Seminario, nome, IS, kristnaska inetnacia renkontiĝo en Germanio, kiun plenguis du-tri generacioj de junaj esperantistoj.

S-ro Moritz efektivigis kompletan itineron sur la kampo de la internacia solidareco en la strebo kaj engaĝo favore al neglektataj lingvoj kaj kulturoj de la mondo, kaj irigis grandan parton de sia energio kaj talento en tiun agadon. El sia naskiĝlanda platdiĉa, tra la kataluna, eŭska aŭ frisa, preter la germana, franca, angla aŭ hispana ĝis afrikaj aŭ oceaniaj lokaj lingvoj. Nun restas al ni lia ampleksa kaj profunda postlasaĵo nin puŝanta al daŭrigado en tiu laboro.

Uwe, estis honoro kaj plezuro por ni. Memoron kaj omaĝon. Koran dankon./RBA



Sekvu per telegram-kanalo
la novaĵojn de IKEL:

<https://t.me/ikeleo>

Koncize el...

🔊 **Usono: oficiala reveno al Kolumba Tago.** Okaze de la 12a de oktobro, la Prezidento de Usono *Donald Trump* oficiale proklamis la Tagon de Kolumbo kiel nacian celebrindaĵon en la tuta lando, cele «omaĝi originan heroon de Ameriko» kaj agnoski la kontribuojn de la italamerika komunumo. Tiu decido kontraŭstarigas agadlinion de lastaj jaroj en multaj urboj kaj ŝtatoj, kie per tiu oktobra tago, sub la devizo Tago de la Indiĝenaj Popoloj oni agnoskis la indiĝenajn popolojn, tuŝitajn de la alveno de eŭropanoj en la kontinenton.

Trump pledas por rekono al la postlasaĵo, fido, kuraĝo kaj persisto de Kolumbo. En tiu deklaro troviĝas neniu mencio pri la konsekvencoj de la ekspedicioj, kies spuroj de perforto, koloniado kaj malsanoj tiel grave kondamnis la vivkondiĉojn de surlokaj popoloj.

Tiu gesto de la prezidento akre skuas la debaton pri la takso ĉirkaŭ la kunvivado de indiĝenaj etnoj kaj de kolonistoj ekde la fino de la 15a jarcento. Tiusence profesoro pri Indiĝenamerikaj Studoj, *Kerri Malloy*, rimarkis, ke «oni ne povas rakonti la historion de la esplorado sen rakonti la historion de la ekspluatado». /*El euronews.com*

🔊 **Karavano favore al la tamazirta (tarifita) lingvo.** Sub la slogano *Amsagar jer dyaspura d Arif: X wbrid n tgumi n tutlayt tariffit*, nome, «Renkonto inter Arifo kaj la Diasporo: vojo por la prizorgo de la tarifita», renkontiĝis de la 27-a de aŭgusto ĝis la 5a de septembro 2025 en *Al Hocejmea* kaj *Nador* (Arifo, Norda Maroko) 50 aktivuloj de la tamazirta lingvo- kaj kulturmovado. Dudek partoprenantoj venis el la eŭropa diasporo (Germanio, Francio, Nederlando, Eŭskio kaj Katalunio) inter ili ĉeestis aktoroj, agantoj en sociaj retoj, muzikistoj, akademianoj ktp. Ankaŭ la delegitaro de Arifo ankaŭ estis varia, 30 aktivuloj el *Driuch*, *Al Hocejma* kaj *Nador* partoprenis la renkonton.

La kerno de tiu projekto kuŝas en la fortigo de la tamazirta identeco kaj la prilaboro en la rilato inter la diasporo kaj la surlokanoj. Tiucele oni aranĝis tri agadliniojn, nome, pritrakto de la teritorio rilate al ĝia historio, la historion specife de Arifo per ateliero pri la aktuala realo de Arifo kaj debat-sesion pri la defioj en la proksima estonteco de tiu komunumo.

La organizantoj tre pozitive taksis tiun renkonton, tial ke sukcese plifortiĝis rilatoj kaj interkonatiĝo inter la teritorio kaj diasporo, kaj aliflanke multaj ĉeestantoj esprimis sian sintenon al engaĝiĝo kaj aktivado en konkretaj projektoj. /*El garabide.eus*

🔊 **HIGA. 5a Renkonto de junaj lingvo-aktivuloj en Eŭskio.** De la 14a ĝis la 18a de julio 2025 okazis por la kvina fojo en Vitoria-Gastejso (Eŭskio) Renkontiĝo de junaj aktivuloj en minorigitaj lingvoj (eŭsklingve *HIGA*).


Reprezentantoj de 68 lingvoj de Afriko, Ameriko, Azio kaj Eŭropo ĉeestis tiun renkonton en la filologia universitato de la urbo.

La celo de la evento estas krei reton de aktivaj junuloj kaj asocioj, kiuj agadas sur la kampo de revigligo de malpliigitaj lingvoj vaste tra la mondo kaj interŝanĝi spertojn kaj informojn pri la disvolvo de konkretaj projektoj.

Pere de prelegoj, debatoj kaj trejnsesioj oni pritraktis temojn kiel la rilaton inter la disvolvo de la koncernitaj lingvoj kaj arto, kulturo, medio, turismo aŭ teknologio.

Inter multaj aliaj, lingvoj kiel la nubia, sardinia, kakĉikela, astura, naŭatla aŭ nasa trovis lokon en tiu juna konferenco.

La kataluno *David Ruiz Sánchez* reprezentis kaj la katalunan lingvon kaj esperanton. Pere de li ĉeestantoj de multaj landoj akiris bazan scion pri la internacia lingvo, kaj ĝia rolo en lingva egaleco. /*El berria.eus*



Eblas reklami en Etnismo!

- Anonctarifo: (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6 p. 15.
- Rabato por IKEL-membroj: 10 %.

LA RETBUTIKO DE KEA

Trovu librojn, revuojn, diskojn
kaj aliajn varojn kaj servojn proponataj
de Kataluna Esperanto-Asocio

<https://butik.esperanto.cat>

Dum 2026,
profitu 5%-an rabaton
en ĉiuj varoj
per kupon-kodo
ETNISMO26

ESPERANTO*
CAT

*Associació Catalana d'Esperanto/Kataluna Esperanto-Asocio

Alvoko al komuna laboro

Prezidanto de IKEL invitas vin partopreni en la agado



MICHAŁ JARMOLI

De aŭgusto 2025, mi estas nova prezidanto de IKEL kaj provizora redaktoro de *Etnismo*. Kelkaj membroj de la antaŭa estraro demisiis el siaj postenoj, aliaj restas. Nun la estraro, kune kun la IKEL-anoj, devas redifini la gvidliniojn de agado kaj klopodoj por la venontaj jaroj. La nova estraro devos restrukturi la funkciojn de ĉiu membro de la stabo.

Mi havas kelkajn ideojn, sed antaŭ ol prezenti ilin, mi volus plue pripensi kaj pritrakti kun la estraranoj. Poste ni surpaperigos tiujn proponojn en *Etnismo* kaj atendos la reagojn de IKEL-anoj kaj simpatiantoj por daŭrigi nian laboron.

Unua alvoko estas partopreni la stabon de la estraro, kun propono

pri konkreta respondeco en iu agadkampo.

Dua alvoko estas serĉi helpantojn por kunredakti *Etnismo*-n, ilo por la disvastigo de niaj celoj kaj jam veterana revuo en la esperanta medio. Laŭ mia opinio nia revuo ludas gravan rolon en la prezento de malpliigitaj lingvoj kaj kulturoj en neŭtrala lingvo, kaj tiu fakto ja estas preskaŭ unika en la agado de asocioj tutmondaj, kiuj strebas al komuna celo promocii etnajn marginigitajn kulturojn.

Mi volus, ke *Etnismo* nutru sin per kiel eble plej multe da kontribuaĵoj verkitaj de esperantistoj kaj en esperanto, ankaŭ ke ĝi pritraktu en siaj enhavoj ĉiunumere novaĵojn pri etnoj el malsamaj regionoj de la tuta mondo. Mi konscias, ke tiu volo povas esti malfacile plenumbla, ĉiuokaze la nun-

tempa konsisto de la revuo, nome kunesto de originalaj tekstoj kaj tradukaĵoj taŭgas.

Alispecaj kunlaboraj vojoj povas esti buntaj kaj variaj. Ekzemple, ni povas starigi aŭ/kaj profundigi rilatojn kun similcelaj lokaj aŭ internaciaj asocioj kaj instancoj plejdantaj por la disvolvo kaj diskonigo de malpliigitaj lingvoj en la tuta mondo. Kunlaboro kun tiaj asocioj povas esti riĉiga kaj inspira en nia agado. Ankaŭ plivastigi en la esperanta medio la konscion pri lingve kaj kulture bunta mondo povas esti interesa agadkampo.

Do, kara leganto, jen invito kaj instigo al partopreno kaj kunlaboro en IKEL kaj *Etnismo*. Nun ni atendas viajn respondojn kaj reagon. /RBA

Fariĝu membro de IKEL



Valorigu la liberecon kaj la diversecon,
aliĝu al la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj
kaj ricevu **Etnismon** senpage



www.etnismo.org